



Subtene al la regiona, landa kaj loka agado



Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbego Koffi, Elda Doerfler

ENHAVO n-ro 60 > • ILEI 2023 • Italio-Ĉinio • Muhire • Turkio < okt. 29

La 56a Kongreso de ILEI ĉe itala marbordo

Tempo: Ekde la 5-a ĝis la 12-a de aŭgusto 2023

Loko: Lignano Orsablà (Itale: *Lignano Sabbiadoro*), Italio

Ĉef-temo de la Kongreso: “Instrui Esperanton en lernejoj”

Retejo de la Kongreso: <https://2023.kongreso.org/>

Post tri sinsekvaj nur-virtualaj Kongresoj, en 2023 la 56-a Kongreso de ILEI denove okazos ankaŭ en ĉeesta medio en la belega urbo Lignano Sabbiadoro en Italio, en la strandurbo Lignano Orsablà (itale: *Lignano Sabbiadoro*) situanta mezvoje inter Venecio kaj Triesto, en ampleksa Kongresejo, kiu permesos al ĉiuj kongresanoj loĝi, manĝi, labori, kaj ankaŭ ferii en la sama feria vilaĝo. La kongresejo disponas, kaj senpage disponigas al la kongresanoj, privatan plaĝon, akvoparkon, olimpikan naĝejon, plurajn altrangajn ekipitajn sportajn spacojn ĉu kovritajn ĉu malfermajn.

La ĉefa temo de la Kongreso estos: “Instrui Esperanton en lernejoj”. La kongresa ĉeftemo certe vekos la intereson ne nur de esperantistoj, sed ankaŭ de profesiuloj pri instruado de aliaj lingvoj, universitataj esploristoj kaj profesoroj, ĵurnalistoj kaj ĝenerala publiko; unuvorte ĉiuj, kiuj iel dediĉas sin al la temo, ĉu profesie, ĉu ne.

Ni atendas vian aliĝon kaj viajn kontribuadojn ĉu pri la kongresa temo, ĉu pri aliaj pedagogiaj temoj, ĉu por la Lingva Festivalo, aŭ por la Internacia Vespero, ktp. Vi povas indiki pri viaj ofertoj kaj kontribuadoj kaj en la aliĝilo kaj per retmesaĝo al:

ilei.kongresoj@gmail.com.

La limdato por sendo de la proponataj kontribuadoj estas la 31-a de januaro 2023, por ke ili certe estu aldonita al la provizora programo de la Kongreso. Por ĉiu via kontribuado, ĉu prelego aŭ ali-speca kontribuado, bonvolu sendi al ni (ilei.kongresoj@gmail.com):

- titolon de la kontribuado
- vian kompletan nomon



- daŭron de la prezentado
- ĉu vi prezentos ĉeeste aŭ rete
- du- ĝis maksimume kvin-linian priskribon de la kontribuaĵo
- du- ĝis maksimume kvin-linian biografion de vi
- vian foton

Kiel kutime, vi povos ĝui ankaŭ ekskursojn, Lingvan Festivalon, spektaklojn, ktp. Vi trovos ĉiujn detalojn pri aliĝo en la kongresa retejo: "2023.kongreso.org". La plej favora aliĝperiodo finiĝas en **la 31-a de decembro**. Trovu la informojn ankaŭ ĉe <https://2023.kongreso.org/alighilo.php>

Jen ligilo por rekte atingi informojn
https://2023.kongreso.org/ILEI_chefa.php



prof. laura brazzabeni, estrarano pri Koingresoj.
 +39 3286461063 (anche whatsapp)
 direttore generale IIE, http: istituto.esperanto.it

UEA kongrese realas sed samtempe virtualas

Sekve de la du sukcesaj Virtualaj Kongresoj okazintaj en 2020 kaj 2021, ĉi-jare UEA organizas la 3-an Virtualan Kongreson kvartage fine de novembro, inter la datoj 24-27.11.2022: <https://vk.esperanto.net>. Se tiu ĉi modelo sukcesos, ĝi eventuale fariĝos konstanta aranĝo, suplemente al la UK. Kaj alia novaĵo estas, ke ĝi okazos samtempe kun [Retoso](#) 2022, la reta evento de TEJO.

La 3-a VK havos kiel temon la saman temon de la 107-a Universala Kongreso, okazinta en Montrealo: "Lingvo, vivo, tero: Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj". Unu el la celoj nun okazigi la VK-n pli proksime de la fino de la jaro estas elstare doni al la temo de la UK pluan traktadon dum la jaro. Do la 3-a VK devos havi specialan atenton al indiĝenaj lingvoj, kun prelegoj kaj kursetoj.



Samtempe la VK utilos kiel retrospektivo de la jaro, kun rememorigoj pri diversaj gravaj okazoj. En 2022 i.a. estis la 135-jariĝo de Hector Hodler, la 125-jariĝo (samtempe 85-jariĝo de la morto) de Eŭgeno Miĥalski, la 100-jariĝo de Eli Urbanová (samtempe 10-jariĝo de ŝia forpaso), la 100-jariĝo de Rejna de Jong, la 100-jariĝo de la Esperanto-radiofonio, la 80-jariĝo de la morto de Lidja Zamenhof, la 70-jariĝo de la Centro por Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) k.a. Aldone al tiuj rememoroj estos ankaŭ riĉa scienca, faka kaj kultura programo, kun spaco por eldonistoj, aŭtoroj kaj artistoj.

Krom rigardo al la pasanta jaro, la VK ankaŭ estos vitrino por novaĵoj: oni prezentos laborprogresojn pri la 108-a UK en Torino kaj ĝiaj diversaj programeroj: i.a. pri Belartaj Konkursoj, Esperantologia Konferenco, scienca programo ktp. Klasike estos la virtuala Movada Foiro (spaco por landaj kaj fakaj asocioj kaj aliaj temgrupoj) kaj

prezento de agado de la komisionoj de UEA. Kaj [Retoso](#) 2022 proponos riĉan programon allogan al junuloj de ĉiuj aĝoj.

Aliĝu al la 3-a VK kaj Retoso 2022 jam eblas: <https://vk.esperanto.net>. La aliĝo estas senpaga por aktualaj individuaj membroj de UEA kaj TEJO en 2022 (por tiuj, kiuj aliĝos ĝis la **18-a de novembro**). Se vi ankoraŭ ne estas aktuala IM por 2022, eblas samtempe aliĝi al UEA kaj al la VK por ĝui la senpagan aliĝon. Okazigi virtualan eventon havas kostojn, do donacoj bonvenas. Ĉiuj, kiuj donacos 50 EUR aŭ pli aperos kiel Subtenanto de VK. Bonvenon aliĝi!

Italio en Ĉinio

Carlo Cattaneo (1801-1869) estas konsiderata la patro de itala sociologio. Li estis unu el la ĉefoj de la rebelo nomata “la kvin tagoj de Milano”, inter la 18-a kaj la 22-a de marto 1848, kiu mallonge liberigis la italan urbon de la kontrolo de la Habsburga Imperio. Kaj li proponis federacian modelon de unuiĝo de Italio kaj Eŭropo. Lia politika penso multe influis homojn kiel socialiston Gaetano Salvemini (1873-1957), kiuj luktis kontraŭ itala faŝismo antaŭ kaj dum la Dua Mondmilito.

Li ankaŭ multe interesiĝis pri la historio kaj kulturo de fremdaj landoj, de Barato al Meksikio, kaj lia eseo “Antikva kaj moderna Ĉinio” (Itale, *La China antica e moderna*) aperis en la dua serio de lia revuo en 1861, kiam Cattaneo jam loĝis en la itale parolanta parto de Svislando. Kaj ĝi estis poste republikita fare de Salvemini en kvar volumoj de historiaj kaj geografiaj verkoj de la sama aŭtoro en 1957.

Sendis Alessandra Madella

Ondo por la tuta mondo

La eldono de “La Ondo de Esperanto” (2022, №313), aperinta antaŭ du semajnoj sur 134 paĝoj, enhavas dekojn da artikoloj pri esperantistaj kongresoj, renkontiĝoj, seminario kaj aliaj eventoj de ĉi-jara Kongresa Sezono. Ĝi estas riĉa ankaŭ literature kun pluraj beletraĵoj originalaj kaj tradukitaj. Legu pli detale pri ĉi tiu numero kaj decidu pri (re)abono por 2023 <https://sezonoj.ru/2022/10/ondo-104/>

Joel Muhire vizitas samideanon en rifuĝejo

Jen mallonga filmeto pri tio. 1 minuto 28 sekundoj. Bone prezentita.

[Joel Muhire vizitas samideanon en Rifughejo Rwasa](#)

Distanca Instruado en Afrika Universitato

Oficas la rektoro de la kongolanda universitato UEC Élisée BYELONGO (Suda Afriko). La Prezidanto de la nova **fondota** fakultato pri Lingvoj, Esperanto kaj interlingvistiko, Renato CORSETTI (Britio). Danke al la nepra helpo de la prezidanto de ILEI, Ahmad MAMDUHI (Irano), kadre de la projekto TIBOR SEKELJ. La franclingva distanca kurso komenciĝis jam en januaro 2021.

Ĉi-jare Renato CORSETTI registras la aliĝantojn al la retkurso. La instruistino por la niveloj 1 kaj 2, Fransoazo (Françoise NOIREAU el Francio), kontribuas per ĉiutagaj

francilingvaj lecionetoj per Vacapo (*WhatsApp*). Estas 6 subaj niveloj kaj 80 gestudentoj aktive respondas al la demandoj kaj progresas en la programo. Jen Francoazo kun violono en la bildo.



La instruisto por la nivelo 3, d-ro Renato CORSETTI, per intensaj ĉiusemajnaj rektaj videolecionoj per Zomo (*Zoom*), 13 gestudentoj enskribiĝis, 5 partoprenas en Zomo, 3 koresponde per ret-mesaĝoj.

Komenco de la universitata periodo en septembro 2022.

Parola ekzameno okazos per Zomo (*Zoom*) antaŭ internacia ĵurio (kun ankaŭ Karine ARAKELJAN, en Armenio), meze de februaro 2023. Atestiloj kun emblemo de la universitato UEC, estas realigotaj de Hamzeh SHAFIEE.

n-ro 082
oktobro 2022

La revueto de la turka esperantistaro

Turka Stelo

SALUTON,

La Konsilio de Eŭropo kaj la Eŭropa Unio ekde 2011 ĉiujare la 26-an de septembro iniciatas la Eŭropan Tagon de Lingvoj. Multaj eventoj okazis ĉi jare en Eŭropaj landoj okaze de ĉi tiu tago, rigardu: <https://dl.com/Events/EventsData.aspx?ki=12777/>

revuo sed ili revenas ĉiujare. Do estu preparota.

En ĉi tiu numero de nia revuo vi trovos multajn interesajn legaĵojn:

Turka stelo - multnacia enhavo

La numero havas fortan kulturan enhavon (prozaĵojn) kaj kontribuojn de Renato Corsetti pri komparoj de kvin eŭropaj lingvoj – inkluzive de la rusa.

Ni al kroĉas la numeron.

===== vortoj: 1185 =====

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio, Slovenio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis majo 2022 (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro de post 2014.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@e-gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.